

LA LAMPIRO

62-a jaro, numero 170, 2021: 4



D-ro Holanda centjaraĝa!

Vidu nian kanalon!



youtube.com/user/Vivagazeto

LA LAMPIRO

62-a jaro, numero 170, 2021: 4

Organo de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Redaktanto: Paulo Sérgio Viana (psviana@terra.com.br)

Grafikaranĝo: Cristovão Rocha Sousa

Revizianto: José Roberto Tenório



La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj artikoloj.

Esperanto-Asocio de San-Paŭlo

Fondita en la 29-a de Marto 1937

Propra Sidejo

Rua Faustolo, 124 - Água Branca
05041-000 São Paulo, SP - Brazilo
Telefonnumero: +55 (11) 3862-1183
easp.org.br | contato@easp.br

Jarkotizo por 2021

Simpla membro.....R\$ 150,00.
Subtena membro.....R\$ 300,00.
Ŝtatinterna membro.....R\$ 75,00.

Dejoroj:

Sabate: 9h - 12h
Escepte en la lasta sabato de ĉiu monato, kiam la deĵoro daŭras de la 9-a matene ĝis la 7-a vespere pro la Kultura Kunveno, kiu okazas posttagmeze (ekde la 16h).

Estraro

Prezidanto: Esmeraldo Alencar Lima

Vicprezidanto: Paulo Sérgio Viana

1-a Sekretario: José Roberto Tenório

2-a Sekretario: Sidnéia da Conceição Beall

1-a Kasisto: Conceição Rodrigues

2-a Kasisto: Maria Delza Macabu

Direktoro pri propagando: vaka

Konsilantaro

Audino Castelo Branco, Marcos Zlotovich kaj
José Mauro Progiante

Anstataŭantoj

Shigueco Takahasi kaj Cristovão Rocha Sousa

Enhavo

Vortoj de la prezidanto	5
Vortoj de la redaktanto	6
D-ro Holanda centjaraĝa!	7
Bovo	11
Dua Virtuala Kongreso de Universala Esperanto-Asocio	12
Renaskiĝis la Muzeo de la Portugala Lingvo	16
2-a Virtuala Kongreso de Esperanto: plongado en la lingvon	17
La forto de la dolĉeco	18
Vojaĝo en Esperantujo	20
La graveco de legado	21
Lingvaj Respondoj	22
Sindonemo	24
Koreaj Malnovaj Rakontoj	26
SERGIO	27



Vortoj de la prezidanto

Saluton al ĉiuj samideanoj!

Ni troviĝas en la mezo de la jaro, kaj ankoraŭ daŭras la pandemio. Sed ni estas vakcinitaj. Nia EASP, same kiel aliaj asocioj, estas fermita jam de longa tempo. Ni mem estas limigitaj al la ekranoj de niaj komputiloj.

Plu funkcias nia EASP-Kafejo, niaj publikigoj en la Viva Gazeto, nia paĝaro. Kaj nia butikoj jam malfermiĝis, por ke vi aĉetu. En la lasta sabato de ĉiu monato ni okazigas nian kulturkunsidon (prelegon kaj postan diskuton), al kiu mi elkore invitas.

Ni preparas ankaŭ nian feston, kiu tradicie okazas je la 12-a de oktobro. Ĉi-jare ĝi okazos virtuale, kaj mi esperas vidi vin ĉiujn en ĝi.

Mi deziras al vi sanon. Baldaŭ ni certe povos fizike renkontiĝi. Mi dankegas ĉiujn, kiuj kunlaboras por nia plua fervora agado por Esperanto en la Ŝtato San-Paŭlo.

ESMERALDO ALENCAR LIMA



Vortoj de la redaktoro

Kun ĝojo ni konstatas, ke nia revuo iom post iom reprenas sian lokon inter la Esperanto-publikaĵoj en Brazilo. Nia lasta numero enhavis interesan artikolon pri la vakcinoj en la pandemia tempo, kaj en socia reto eksterlanda samideano reagis iom furioze, ĉar li kontraŭas vakcinojn. Nu, li rajtas. Ni ne konsentas kun li, sed ni plene respektas ĉies rajtojn pensi. Li ne petis, ke ni publikigu lian konteston, tial ni ne faras tion. Sed malgraŭ nia konsterno, ke ankoraŭ ekzistas homoj, kiuj bedaŭrinde neas la efikon de vakcinoj, tamen ni estas feliĉaj, ke La Lampiro vekis atenton kaj reagojn de pluraj homoj, almenaŭ en socia reto. Ni plu verku pri niaj aktualaj problemoj!

Dume nia bulgara samideanino Ivaniĉka MAĜAROVA denove regalas nin per bela rakonto, pro kiu ni dankegas. Bonan legadon!

PAULO SÉRGIO VIANA

D-ro Holanda centjaraĝa!

M. ZLÓV, el San-Paŭlo

La multe konata brazila Esperantisto-aktivulo D-ro Osvaldo Pires de Holanda [osvaŭdu piriz djolanda] kompletigis en la pasinta 19-a de Julio cent jarojn da fizika ekzistado en nia planedo.

Naskiĝinta en la urbo Baturité (ŝtato Cearao, Brazilo), Holanda partoprenis la fondon de Verda Stelo Esperanta Grupo kreita en lia urbo en 1940. Sed ekde 1944 li loĝas en la urbo San-Paŭlo. Kaj de tiam li multflanke tre aktivas kun granda energio, persisto kaj idealismo senĉese en la Esperanto-Movado.

Ĵurnalisto (diplomiĝinta en 1961), juristo kaj advokato (diplomiĝinta en 1971), verkisto, poeto, tradukisto, instruisto kaj instruanto de Esperanto... Dum sia tuta vivo li ankaŭ multe prelegis, krom pri sia fakoj, ankaŭ pri Esperanto en universitatoj kaj kulturaj, sociaj, religiaj kaj esperantistaj kongresoj kaj aliaj eventoj kaj institucioj.

...Li iniciatis kaj kunfondis plurajn Esperanto-klubojn kaj grupojn en tiu, kiu estas la plej granda metropolo de la lando. Inter ili menciindas E.K.Z. (Esperanta Klubo Zamenhof), unu el la malmultaj Esperanto-institucioj kun propra sidejo.

Tiu ĉi estas en la orienta kvartalo São Miguel Paulista (aŭ San-Mikaelo) (fondita en la jaro 1949), kvartalo en kiu li ĉiam ĉefe laboris kaj loĝis kaj ĝis nun loĝas, kune kun sia amata kaj aminda edzino Delza (Maria Delza Macabu de Jesus, kiu nuntempe apartenas al la nomaro de la Estraro de EASP - Esperanto-Asocio de San-Paŭlo).

Aliaj grupoj iniciatitaj kaj kunfonditaj de li, dum pluraj jaroj ĉiuj el ili estis multe konataj en la urba movado kaj aktivaj, estas EGABEM (Esperanto-Grupo Bezerra de Menezes, en 1982) ankaŭ en orienta kvartalo, Penha de França; la Esperanto-Grupo Verda Lumo (en 1995), en la norda kvartalo Santana; kaj Pirituba Esperanto-Grupo (en 1996), en tiu nordokcidenta kvartalo.

Holanda estas ankaŭ eks-prezidanto kaj de EASP(1994-1995), de kiu li estas Honora Membro, kaj de Brazila E-Ligo (1998-2001). Dum tiu lasta prezidanteco li lanĉis kampanjon, por ke la Ligo atingu la markon de 1000 membroj, celo konsiderata neeblaĵo, sed li sukcesis! Pro tio, ke mi instuis Esperanton en USP (Universitato de San-Paŭlo) kaj mi havis multajn lernantojn de nia lingvo kaj, ke mi fervore aliĝis al tiu

kampanjo, en la fino mi havis la honoron ricevi de liaj manoj la pokalon de “plej elstara disvastiganto”

Fakte, estis li, kiu kuraĝigis min fariĝi Esperanto-instruanto. En la jaro 1979 mi diplomigis en EASP en la pedagogia kurso kaj tuj poste mi translokiĝis al Piracicaba, en la interno de la ŝtato, por frekventi la Universitaton (kampuson de USP en tiu urbo). Kaj mi eniris la universitaton en 1980 (tiam mi estis 18-jara) kun la firma celo aranĝi la ŝtatan renkontiĝon de Esperanto de tiu jaro (la nuna nomo de tiu evento estas “kongreso”). La evento estis sukcesa, sed en la fino mi vidkonstatis, ke mia laboro finiĝis.

Mi vizitis ĉiujn kursojn de EASP por lerni la lingvon, ne pripensante pri instruado. En la adiaŭa momento, tamen, mi konfesis al Holanda mian senton pri soleco, ke mia laboro estas finita. Kaj li trovis por mi la solvon: kial mi ne fariĝu pioniro en tiu grava urbo instruante Esperanton, kiu ĝis tiam ne havis Esperanto-movadon? De tiam mi gvidis nenombreblajn kursojn de la internacia lingvo, unue en Piracicaba mem, poste en San-Paŭlo, ĉefe en USP, dum multaj jaroj, kaj aliloke ankaŭ. Se ne estus tiu mia menciita interparolado kun Holanda, plej probable mi ne estus fariĝinta E-instruanto.

Holanda tradukis, el la portugala en Esperanton, Vivo Feliĉa, de la medio Divaldo Pereira Franco (spirita aŭtoro: Joanna de Angelis), La Evangelio de la Horo (libro nereligia, anarkiisma, de Paul Berthelot), multaj poemoj, recenzoj ktp. Pli ol 15 libroj venis al ni el lia plumo kaj en la portugala kaj en Esperanto.

Li ankaŭ estas membro de pluraj Akademioj pri Beletro kaj kunlaboras kun prestiĝaj periodaĵoj kaj literaturaj revuoj.

Holanda ankaŭ preparis pli ol 500-paĝan libron pri la riĉa historio de la brazila E-movado, kiu, tamen, atendas publikigon (kaj aktualigon).

Ĝis antaŭ la pandemio, mi, Holanda kaj Delza ĉiusemajne vizitis kune la saman spiritisman domon, Spiritisman Centron Fratino Klara (Irmã Clara), nun ni daŭrigas la kontakton ĉefe telefone.

Amike via, D-ro Osvaldo Pires de Holanda, cent gratulojn! ■





Renaskiĝis la Muzeo de la Portugala Lingvo

La redaktoro

Ducent sesdek milionoj da homoj en kvar kontinentoj parolas la portugalan lingvon, en naŭ landoj. Iasence, ĝi estas unu el la plej tutmondecaj lingvoj. Ĝi disvastiĝis danke al la ŝpirado de portugaloj, dum jarcentoj, en majestaj aventuroj. La portugala lingvo havas la guston de maro, sed ĝi alprenis la spiriton de sudamerikanoj, de afrikanoj kaj de azianoj. Ĝi estas lingvo, kiu faciligas belsonan interfratiĝon.

Ĝi plene meritas muzeon, kie registriĝu ĝiaj historioj kaj koloroj. La Muzeo de la Portugala Lingvo, en la urbo San-Paŭlo, Brazilo, estas inda hejmo por tia dokumentado. Tie, nia lingvo ricevas dignan pritraktadon. En la jaro 2015, ĝin trafis horora brulego, kiu plorigis la portugallingvanojn en la tuta mondo.

En ĉi tiu monato julio 2021 ĝi reinaŭguriĝis, kaj tial festas la tutmonda parolantaro de la lingvo de Camões. Denove nia lingvo havas sian templon.

Antaŭ kelkaj jaroj, la estraro de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo vizitis la muzeon en ekskurso. Tiuokaze, ni donacis al la administrantoj kelkajn verkojn de gravaj portugallingvaj aŭtoroj, tradukitajn al Esperanto. Almenaŭ ĝis la tragika brulego, ili estis parto de la konstantaj ekspoziciaĵoj. Kio okazis post la akcidento?

Estas tempo reviziti la muzeon, realporti novajn librojn kaj reesprimi nian respekton al nia nacia lingvo, same kiel ni respektas Esperanton, la duan lingvon por ĉiu popolo. ■



Iom da poezio

Esperantigis Paulo S. Viana

Marco Lucchesi estas brazila verkisto, poeto, eseisto kaj Esperantisto. Li estas prezidanto de la Brazila Beletra Akademio. Pro lia fervora defendo kaj uzado de Esperanto, lin omaĝis Universala Esperanto-Asocio, okaze de la 2-a Virtuala Kongreso. Marco Lucchesi brile inaŭguris la lastan Renkonton de Esperanto de Ŝtato Rio-de-Janeiro.

Lia poezio estas dense simbola kaj surpriza. Ĉi-sube ni prezentas unu lian tipan poemon.

Boi

Tive um boi
na minha infância
 boi trazido
pelo vento

Boinuvem

seu mugido
era intangível
e os olhos
 lassos
cheios de piedade

 Boitempo
de uma infância
que não passa

Bovo

Mi havis bovon
en mia infan tempo
 bovo alportita
de vento

Nubobovo

 ĝia bleko
estis netuŝebla
kaj la okuloj
 lacaĵ
plenaj de pieco

 Bovtempo
de infanaĝo
kiu ne pasas for

Dua Virtuala Kongreso de Universala Esperanto-Asocio

MARIA APARECIDA ARAÚJO

La 2-a Virtuala Kongreso (2-a UK) estis organizita de UEA, kun teknika prizorgo de E@I. Ĝi okazis dum la semajno 17-24-a de julio 2021, dum la horoj 12h00 ĝis 18h00 UTC. La 2-a Virtuala Movada Foiro, kaj Babilĉambroj, okazis dum la samaj tagoj, sed antaŭ 12h00 kaj post 18h00, resume dum 24 horoj, favore al ĉiuj kontinentoj.

Retevent.com estas nova enreta renkontiĝa platformo de E@I, kiu celas helpi okazigi grandajn virtualajn eventojn.

En la dudeka jarcento ankaŭ estis nuligitaj UK-oj. Nun, pro la monda pandemia stato, eblas parte anstataŭigi la fizikajn eventojn, sed estonte eblas tute bone ĝin uzi por kunigi homojn, kiuj povas nur tre malfacile aŭ entute ne povas renkontiĝi fizike. La platformo povas krei inter unuopaj membroj senton de komuneco, malgraŭ la fizika distanco.

La solena malfermo okazis la 17-an de julio. Enkondukis la eventon la Unua Vicprezidanto de UEA Fernando Maia, kun bonvenigaj vortoj de Orlando Raola, Duncan Charters, Margaret Zamenhof, oficialaj paroladoj de Akademio de Esperanto, SAT, ILEI, TEJO kaj UEA, salutoj de Belfasto, inaŭgura koncerto, prezento de la kongresa

temo, kontinentaj salutoj, kaj himno La Espero.

Kongresa Temo: "Paco kaj konfido: universalaj valoroj" estis diskutitaj en ĉefaj prelegoj, kaj ene de Tago de Lernado kaj kunligita al diversaj temoj de aliaj programeroj. **Sekve, dum ok tagoj venis bunta kaj riĉenhavaj programeroj:**

Petro kaj Zsófia, kiel reprezentantoj de la **Esperanto-Centro Herzberg en Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo**, prelegis pri ĝia kreskanta Esperanto-biblioteko, donis enrigardon pri ĝiaj kolektaĵoj, kaj krome raportis pri la vastaj agadoj dum jam 15 jaroj.

Kvizo: UEA lanĉis en tiu ĉi daŭre malfacila tempo de limigoj de personaj kontaktoj, tutmondan enretan kvizon, kies celoj estas samtempe edukaj kaj amuzaj. Ĝi proponas eblajn novajn, utilajn informojn pri Esperanto kiel tutmonda fenomeno. Ĝi estis lanĉita en la unua tago de la 2-a VK, kaj daŭros ĝis la 31-a de aŭgusto 2021. Prezentis la programon Fernando Maia kaj Peter Baláz. Se vi scivolemas pri la kvizo, pli da informo en:

<https://kvizo.esperanto.net>

Humphrey R. Tonkin babilis pri pluraj novaj evoluoj en la rilato kun UN kaj UNESKO.

Margaret Zaleski Zamenhof estas la pranepino de Doktoro Zamenhof. Ŝi estas kuracistino kaj babilis pri siaj familianoj, pri sia lernado de Esperanto, kaj pri sia laboro. Katalin Kovatis prelegis pri KER-ekzamenoj, Fondaĵo Edukado.net kaj vitrarto.

Oratora Konkurso de UEA. Ĝi celas “evolui la Esperantlingvan parolarton inter la junularo”. 2-a premio estis al Manuela Burgheloa (Brazilo).

Kunmanĝado tra la Mondo: Virtuala Kongreso-bankedo, donis la eblon plenumi la nepran bezonon de la homoj, kunmanĝi. La partoprenantoj montris al la mondo kiel ili festas per manĝado, tipe lokaj aŭ festenaj pladoj, en hejma etoso kaj ankaŭ kiel la manĝaĵoj estis preparitaj.

Programo Mia Amiko (PMA), sub la givdo de Adonis Saliba, ekzistas ekde 2011 kiel sendependa iniciato, tamen kun la apogo de Brazila Esperanto-Ligo. Ĝi multe evoluis lastatempe. Oni povas diri, ke PMA estas kiel la tradiciaj kluboj, sed en virtuala mondklubo, kie oni lernas, kaj volontule laboras: <http://esperanto.brazilo.org/programa-mia-amiko> .

Alvaro Motta, nome de Eldonejo Lorenz prelegis pri 45 jaroj da disvastiga laboro de spiritistoj, por la Esperanto-movado en Brazilo .

Leandro Abrahão, nome de Brazila Asocio de Esperantistoj-Spiritistoj, parolis pri la ĵus lanĉita “Gazeto de

BAES” kaj la antaŭa provo enmondigi fakan periodaĵon pri transaj temoj oscedas pli ol 100 jaroj.

Querino Neto, Vic-Prezidento da BEL, nome de Brazila Esperanto-Ligo kaj Brazila Esperantista Junulara Organizo, prezentis la agadon de brazila esperantista movado dum la lastaj jaroj.

Legoklubo de BEJO okazigis la julian kunvenon kiel klasĉambron, ene de 2-a VK. Sub la gvido de Miguel BENTO, ni pridiskutis la libron “Brazilano laŭleĝe, Esperantisto laŭkonvinke”, de Paulo Silas.

Alvaro Motta, Allan Argolo kaj Affonso Soares prelegis pri la temo "Konstruante Katedralojn en la Antropoceno": la filozofio pri reenkarigi en la formado de la bonaj pragepatroj. Prelego omaĝe al la lanĉo de Jardeko por Riparado de Vivsistemoj (2021-2030) deklarita de Unuiĝintaj Nacioj: Nia nuna erao, pro la ŝanĝoj, kiujn la homoj jam faris sur la surfaco de la Tero, estas ankaŭ konata kiel la Antropoceno.

James Rezende Piton kaj Elda Doerfler, prelegis pri: la celoj de ELF / AREK (Esperanto-Ligo Filatelista / Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj), pri tri fruaj esperantistoj Rodo, Larose kaj Hechtl, kaj la spuroj de ilia kultura agado, kaj pri la rando de (mal)konfido: Esperanto tra la kribriloj de poŝta cenzuro, kadre de la temo “Paco kaj konfido: universalaj valoroj”.

Monda Foiro - Pluraj Landaj Asocioj kaj Esperantaj Organizoj

prezentis siajn agadojn por doni impreson pri la vasteco kaj vario de la movado. Inter ili Itala Esperanto Federacio; Germana Esperanto Asocio; Ĉinio kaj Esperanto, 100 jaroj; Meksika Esperanta Federacio; Esperanto en Afriko; Interkultura Centro de Hezberg; Kroata Esperanto Unuiĝo; Esperanto Ligo de Israelo; Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj – ILEI; Esperanto en Ameriko; Esperanto en Azio; Esperanto en Aŭstralio kaj Oceanio; Skolta Esperanto Ligo; Japana Esperanto-Instituto, kaj dekoj da aliaj.

VidBabilejo aŭ babilĉambro estis loko kien oni povis eniri, interparoli aŭ nur aŭskusti, pri pli ol kvindek temoj, inter ili: sano, religio, scienco, sportoj, ludoj, ekologio, literaturo, astronomio, turismo, besto-ŝatantoj, filmoj, ktp.

Koncertoj: Flávio Fonseca

prezentis la plej grandan kolekton de brazila muziko en Esperanto en la tuta mondo. Kim Ribeiro, prezentis Koncerton “Muzika dialogo”. Tom, brazila repisto, kantis kaj deklamis en dek kvin minutaj prezentaĵoj, plurfoje dum la tuta evento.

Koncerto de Kajto. Koncerto Sepa kaj Asorti. Koncerto Jomar kaj Nataŝa kaj Koncerto de Marta kaj JoMo .

Tutmonda Ekskursataĝo, Amri Wandel, la ekskursata kunordiganto prezentis la diversajn ekskurslokojn sur mondmapo. Poste li ĉiĉeronis la

virtualan ekskurson en Jerusalemo: de la Tomba Preĝejo ĝis la Lamenta Muro; Duncan Charters, en la usona kolegio Principia kaj Esperanto-klubo en Benelukso; Rafael Henrique Zerbeto en la Somera Palaco (aŭ la “Malpermesita Urbo”) en Pekino; Manuela Burghilea en Tuluzo, Belen kaj Rio de Janeiro. TEJO, Petro Cleaves en Belfasto kaj Edinburgo.

“Dankon, Zamenhof” estas kanto verkita de la brazila poetino Nazaré Laroça, kantata de la brazila esperantistino Dirce Sales. La kanto estis verkita en 2012 kaj prezentita dum la Nacia Vespero de la 97-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) de 2012 en Hanojo kiel karnavala marŝeto kaj nun estis donacita al UEA viva kiel danko-simbolon pro la okazigo de la 2-a Virtuala Kongreso de Esperanto en 2021 post nuligo de la 106-a UK, en Belfasto-Irlando. La kanto spekteblas ĉe UEA viva: <https://mallonge.net/g6> .

Fermo de la 2-a Virtuala Kongreso de Esperanto de UEA.

Malfermis la Fermon Tone, kiu kantis kanton el sia albumo Repe, ritme, sone. Enkondukis la eventon Fernando Maia, kiu emfazis, ke malgraŭ la problemoj, esperantistoj sub la gvido de UEA sukcesis daŭrigi la tradicion de la Universalaj Kongresoj, kiu altiris intereson de 1829 partoprenantoj el 105 landoj. La Internacia Esperanta Koruso interpretis “La lasta rozo”, omaĝe al la samideanoj-esperantistoj


forpasintaj dum la monatoj de la tutmonda pandemio. Duncan Charters, la Prezidanto de UEA anoncis novan membron de la Honora Patrona Komitato de UEA – Marco Lucchesi el Brazilo, brazilan verkiston, esperantiston kaj profesoron de la Federacia Universitato de Rio-de-Janeiro, prezidanton de la Brazila Beletristika Akademio. Post la anonco estis montrita video-mesaĝo de Marco, kie li parolis en Esperanto. Amri Wandel, resume pri la scienca programo, rekomendis kiel la plej bonan resumon la IKU-libron, kiu estas senpage elŝutebla en <http://iku2.trovu.com/>. Per ĝi eblas bone demonstri la valoron de Esperanto ankaŭ sur la kampo de scienco, per tekstoj de 8 IKU-prelegoj, 4 prelegoj de la Scienca Kafejo, kun temoj tre variaj, inter natursciencoj, medicino, literaturo, lingvaj rajtoj kaj plie. Estis anoncitaj 14 ricevantoj de la Diplomoj pri Elstara Agado aŭ pri Elstara Arta Agado, aljuĝataj de la Estraro de UEA. Inter ili Rafael Lima (Brazilo) pro la elstara agado kiel kreinto kaj prizorganto de la retejo de UEA UN Esperante (unesperante.wordpress.com) kaj ĝiaj profiloj en sociaj retoj; kaj Paulo Sérgio Viana (Brazilo), pri Elstara Arta Agado, plurfoje premiita en la Belartaj Konkursoj, pro la elstara kontribuo al la E-kulturo kiel tradukisto, eldonisto, recenzisto kaj kontribuanto de Beletra Almanako kaj Esperanta Retradio. Poste la

Internacia Koruso adiaŭis la irlandan LKK kaj la kongresurbon Belfaston per la kanto Irlanda Beno. Orlando Raola dankis al Fernando Maia, la ĉefa organizanto kaj inspiranto de la VK-oj. Fermis la eventon muziko, laŭ kiu kongresanoj kantis La Esperon dum la 72-a UK, kiun gastigis Varsovio, Pollando, en 1987. Duncan Charters deklaris la 2-an Virtualan Kongreson de Esperanto fermita.

Venontaj Kongresoj: Ĉeesta evento – renaskiĝo de la Universala Kongreso, ĝi okazos en 2022 en Montrealo, planita por 2020, finfine realiĝonta en 2022. Montrealo atendas la mondan esperantistaron al tiu ĉi festego kaj festivalo de Esperanto!

<https://uea.org/kongresoj>
UK 2023 okazos en Torino/Italio.
“LA KOLOMBO DE PACO”, estis la kuriero de la 2-a VK.

La virtuala kongresejo
(<https://vk.retevent.com>)
funkcios ĝis la 19-a de septembro, dimanĉo. Tio signifas, ke kongresanoj havos ĝis tiam por respekti programerojn. Tiuj, kiuj ne aliĝis al VK, povas ankoraŭ tion fari per la VK-aliĝilo ĉe <https://vk.esperanto.net>. Ne plu estas kotizoj por aliĝi al VK, do individuaj membroj de UEA, kiuj ne aliĝis, povas denove aliĝi senpage por spekti la registritajn programerojn, kiuj abundas. ■



2-a Virtuala Kongreso de Esperanto: plonĝado en la lingvon

ALEKSANDRO PRADO

Okazis en la lastaj tagoj ia potenca senkorpa mistero tra la aero, aŭ plibone per la interreto, eble neniam revita de Zamenhof. Certe vi scias, okazis la 2-a Virtuala Kongreso de Esperanto (VKE), tiam 1804 personoj el 106 landoj kuniĝis. Ne sub verda standardo ni sidis, sed antaŭ komputilo, tie la plej fervoraj diligentaj eltenis 8 tagojn, 24 horojn de la programo.

Unue, mi rajtus proponi ke VKE ŝanĝu sian nomon al VEK, ĉar esence ni devas resti vekitaj dum la tuta kongreso. Ne eblas partopreni nur parton de la kongreso, pro tio ke oni volas spekti kaj partopreni ĉion. Pripensu, kara leganto, dum la programo vi partoprenas babiladon kun la Akademio, poste estas virtuala movada foiro pri edukado, tiam se vi stumblos, vi vizitas la kafejon kaj restas tie pliajn horojn por babilu kun amikoj el tuta Ameriko, ekzemple. Dume, la horoj pasas, tiam estas noktomezo kaj vi scivolemas babilu kun Duncan Charters. Vi tute ne perceptas kaj estas la 1-a horo matene, ĉu eble vi rajtas dormi nun? Ne, vi eniras babilrondon pri Filozofio. Kiam neatendite la tago aŭroras, birdoj pepas, vi partoprenas babilrondon pri egalrajtoj inter genroj.

Interesvekaj fenomenoj okazas dum la kongreso: ni kleriĝas dum universitata programero; ni lernas pri parolarto dum prelego de Leandro Abrahão; ni diskutas pri multaj temoj

dum la babilrondoj. Kaj ni multe amuziĝas ĉe la koridoro kaj la kafejo. Ĉeestaj kongresoj estas gravaj, tamen evidentiĝas ke perretaj kongresoj estas granda okazo por pli oportune amikiĝi kun multaj homoj el diversaj landoj. Alia interesa okazo dum la kongreso estas partopreni babilrondon pri hejmbestoj, ekzemple, kie neniu posedas hejmbeston, ni estas tie simple por neformale konversacii.

Plie, se vi hontas aŭ ne pretas paroli, vi estas tute akceptinda partopreni rondon tute silente por praktike aŭskulti diversajn akĉentojn, tamen silentu en Esperanto! Foje, ĉiuj silentas en Esperanto dum babilrondo. Amuze, ĉu ne? Pri akĉentoj estas amuze diveni la landon de la alilanda amiko.

Nu, kara leganto, mi nur ne rajtas diri kio okazis en la ĉambro drinkejo, ĉar kio okazas tie, restas tie; bonhumore mi ŝercas. Bonŝance dum la virtuala kongreso estas registritaj prezentoj, kiuj estas disponeblaj ĝis la 19-a de Septembro.

Fakte, kongresoj aŭ, plibone, Esperantaj aranĝoj estas nemaltrafeblaj okazoj por plonĝi en la lingvon, tial estas Universalaj kongresoj kaj nune estas la virtualaj kongresoj. Tiam, ne maltrafu tian sperton! Mi sugestas al vi viziti la paĝaron Eventa Servo (<https://eventaservo.org/>) kaj plonĝi en la lingvon. ■

Iom da filozofio

La forto de la dolĉeco

José Mauro Progiante

Ne ekzistas virto nur de viroj aŭ de virinoj. Kompreneble, ĉiu homo povas ami, esti prudenta aŭ justa, sendepende de la sekso. Tamen, same kiel oni faras pri diversaj aferoj - profesioj, objektoj, fenomenoj -, oni nature atribuas al la virtoj trajtojn de vireco aŭ ineco, eble pro influo de la arketipa nocio, ke la viroj estas pli aktivaj kaj la virinoj pli pasivaj. Kelkaj virtoj manifestiĝas precipe en atentovekaj faroj, multfoje eĉ heroecaj, kiel la kuraĝo, dum aliaj, kiel la pureco, estas rekonataj en cirkonstancoj de simpla gesto, de silento, de neago. Tia estas ankaŭ la dolĉeco, virto, kiu multfoje montriĝas per nura rigardo aŭ alia senbrua esprimo. Ĉar la dolĉeco tiel delikate aperas, oni ĝin asocias kun virineco, kvazaŭ ĝi estus ina virto. Kaj tio malhelpas la

disvolviĝon de tiu virto en la viroj, ĉefe en la Okcidento. Eĉ multaj patrinoj antaŭjuĝe ne rekomendas, ke la knaboj valorigu la dolĉecon. Domaĝe, ĉar la viroj, kiuj ĉiam kaŭzis la militojn kaj la plimulton da perfortaĵoj, nur sin detenas en la detruado pro sia ioma ineco, pro la malmulto da dolĉeco, kiun ili portas. Rigardi la dolĉecon kiel ne tre gravan estas granda eraro. Ĝi ĉiam estis esenca por mildigi la efikojn de aliaj virtoj. Ekzemple, certe la amo estas bona, sed sen dolĉeco povas okazi, ke la amato ne perceptas ĝin en la vortoj aŭ gestoj de la amanto. Patro malpermesas, ke filo vojaĝu kun amiko, ĉar li scias, ke tiu amiko estas krimulo, kaj li devigas la filon resti hejme. Tamen li parolas tiel akre, ke la filo ne komprenas, ke tiuj vortoj devenas el amo, kaj ribelas

kontraŭ li. La filo komprenus, se estus dolĉeco en la parolo de la patro. La bonkoreco estas inda. Tamen, se bonkorulo provizas malriĉulon per io ajn sen dolĉeco, povas okazi, ke la pridonacito sentu sin ĉagrenita. Ĉion la dolĉeco igas pli malpeza, pli agrabla. Kiam ĝi ĉeestas, neniu parolo estas kruda, la almozo naskas dankemon, oponentoj respektas unu la alian. Certe en ĉiuj epokoj ĝi estis necesa, sed en la nuntempo eble pli, ĉefe en la sociaj retoj. La homo posedanta dolĉecon estas pacema, rifuzas kaŭzi suferon, ofendi kaj detrui. Tio ne signifas, ke li aŭ ŝi estas pacifisto, ĉar pacifisto aĉetus la pacon

kontraŭ iu ajn prezo. Kvankam la dolĉeco proksime rilatas al la paco, la pacemuloj ne hezitas uzi la forton, se tio necesas por defendi malfortulojn kaj estigi justecon. Nur malmulte da homoj spicas sian konduton per spontanea dolĉeco. Por la plimulto, ĝi estas akirenda virto, feliĉe instruebla kaj lernebla hejme kaj senpage. Sciu gepatroj, geavoj kaj geonkloj, ke dolĉeco tute ne estas signo de malforteco. Kontraŭe, la animoj dolĉaj estas la plej fortaj. Nur ili kapablas rompi la dikajn sufokajn bobelojn da malamo, agresemo kaj netoleremo ĉiutage ŝvebantaj en niaj interrilatoj. ■



Vojaĝo en Esperantujo

EDUARDO GARCIA (Porto Alegre)

Antaŭ nelonge mi esperantistiĝis (por uzi ĉi tiun tre ĉarman verbon), mi estas freŝbakita - aliaj povus diri - kaj mi multege da aferoj lernis dum ĉi tiu vojaĝo, ankaŭ ke mi simple devas danki al la homoj kiuj helpis min en la procezo, ĉefe al la homoj kiuj neniun kvanton da mono gajnis, tamen kiuj en maniero tre kortuŝa kunlaboris por igi tiun utopion realo. Mi ege ĝojas paroli Esperante pri la Eo-movado kaj ankaŭ pri io ajn, kio rilatas al homoj, ĉar por tio estas lingvoj, ĉu ne? Ĉu artefarita aŭ ĉu “natura”, ĉiuj estas rimedo por krei rilatojn inter homoj por komuniki, ĉu ideojn, pensojn, klaĉojn, ŝercojn, rakontojn ktp. Mi ŝategas koni diversajn homojn el la tuta mondo kaj kontaktiĝi regule kun tre specialaj personoj kaj ĝuste tion ebligas la lernado de Esperanto. Ankaŭ rilate al tio, estas la fakto ke mi povis koni multege da amindaj homoj, pere de tiu lingvo, kio certe ne okazus se mi ne scipovus paroli ĝin.

Ĉu Esperanto estas morta lingvo? Do mi devas esti mortigita kun ĝi! Aŭ eble mi estas mortinto sur la tero, kiu promenas sen certa direkto, ĉu tio ŝajnas al vi?

— Tute ne, vi verŝajne diras.

En la Monda Historio, estas multnombraj la homoj, kiuj estis

persekutataj pro la fakto ke ili nomis sin mem Esperantistoj. Tio ebligas al ni ĉiuj alveni al la konkludo aŭ almenaŭ al la demandoj. Sur kio baziĝas tiu ideo por esti tre admirinda? Ĉu estas nur gramatikaj reguloj aŭ ekzistas iom pli? La respondon mi lasas al vi.

Laŭ mi, estas pli klare ol akvo ke Esperanto ne nur vivas sed ankaŭ sur ĝi baziĝas tre malferma komunumo kaj ankaŭ tre bonveniga al novaj homoj. Verdire, ĝi estas minoritata lingvo: Jes, tio veras. Sed ĉu tio iamaniere ŝanĝas tion, kion oni sentas pri ĉi tiu tre interesa kaj rimarkinda projekto? Por mi, tre indas lerni ĝin kaj ĝin regule praktiki ĉar mi nomas min Esperantisto! Memoru tion: Ni estas la nura specio kiu povas uzi vortojn pere de kiuj ni povas priskribi mondojn, kiuj ankoraŭ ne ekzistas. Tamen, indas esti esperanto. ■



La graveco de legado

LUÍS EUCLIDES DOS SANTOS

La legado estas formo de feliĉo.

(Jorge Luis Borges)

Legi estas tre grave. La homoj, kiuj legas regule, skribas pli bone kaj estas pli klareprimaj, estantaj kapablaj esprimi siajn pensojn ĝuste.

Tamen, ne ĉiuj ŝatas legi.

Se vi havas malfacilecon por disvolvi la legokutimon, atentu pri la sekvaj konsiletoj kaj vi tuj estos leganta avide.

Por komenci, pensu pri la avantaĝoj esti asidua leganto. Kiam vi legas nefikian libron, ekzemple, vi povas lerni multajn aĵojn, kiujn antaŭe vi ne sciis. Kiam vi legas fikcian libron, kiel romano, vi povas vojaĝi al lokoj, pri kiuj vi eĉ ne imagis, ke ili ekzistas.

Kiel vi vidas, legi povas esti utile kaj amuze.

Tamen, kiel komenci legi?

Laŭ la mortinta profesoro Pierluigi Piazzzi, se vi ne ŝatos la unuan libron, kiun vi komencos legi, ne senkuraĝiĝu. Komencu legi alian,

poste alian, kaj alian, ĝis vi malkovros la specon de libro, kiu plaĉas al vi.

Kiam vi legos la unuan fojon libron, kiu plaĉas al vi, vi sentos tiel grandan plezuron, ke vi fine volos senti ĝin denove. De tiam, vi perdos nenium okazon havi novan libron en viaj manoj.

Pripensu la suprajn konsiletojn kaj bonan legadon! ■



Lingvaj Respondoj

FRANCISCO S. WECHSLER

Demando:

Kiel uzi la akuzativon post anstataŭ?

Respondo

Tiu ĉi dubon jam klarigis
Zamenhof mem:
Pri la akuzativo post “anstataŭ”

Kiel ĉiu alia prepozicio, tiel ankaŭ “anstataŭ” per si mem postulas ĉiam la nominativon; se tamen ofte oni trovas ĉe bonaj aŭtoroj post “anstataŭ” la akuzativon, tiu ĉi lasta estas uzita ne pro la prepozicio, sed pro aliaj cirkonstancoj. Ekzemple, en la frazo: “Petro batis Paŭlon anstataŭ Vilbelmon”, la lasta parto de la frazo prezentas nur mallongigon (= anstataŭ bati Vilbelmon), kaj la akuzativo forigas ĉiun dubon pri tio, ke anstataŭigita estis ne la batanto, sed la batato.

Respondo 51, Oficiala Gazeto, IV,
1911, p. 2

Jen kelkaj el la pluraj Zamenhof-aj ekzemploj (ĉiuj sen akuzativo post anstataŭ):

Anstataŭ vino li enverŝis en mian glason ian malagrablan acidaĵon [...] (Dua Libro, 1888)

[...] ni konsilas pli uzadi ĉiam formojn simplajn anstataŭ kunmetitaj. (La Esperantisto, 1891, p. 23)

[...] ni povas uzi la akuzativon anstataŭ la prepozicio “je” [...] (La Esperantisto, 1892, p.62)

Pli bone mi anstataŭ tio prezentos al vi mian amon [...] (La Revizoro, 1907)

Anstataŭ kafe li donis al mi teon kun sukero [...] (Ekzercaro de la Fundamento, 1907)

[...] anstataŭ lavujo li havis antaŭ si la tutan rivereton [...] (Fabeloj de Andersen 1, 1909)

Kaj Abraham [...] prenis la virŝafon, kaj oferis ĝin [...] **anstataŭ sia filo.** (Malnova Testamento, 1916)

Mi ne sukcesis trovi ekzemplojn Zamenhof-ajn pri akuzativo post anstataŭ, krom la supre citita Lingva Respondo. Jen tamen kelkaj ekzemploj pri tio, ĉerpitaj ĉe aliaj aŭtoroj:

La princo, enuante, anstataŭ la arenon rigardis la loĝion de la feniciaj pastroj. (Kabe, La Faraono, 1907)

[...] mi montros al vi mian plej bonan pantalonon... ĝi surhavas anglajn arĝentajn monerojn anstataŭ kuprojn.

(John Merchant, Kompatinda Klem, 1931)

[...] miaj ĉukĉaj senlaboremuloj forfumos ĝin [...], kaj anstataŭ ĝin mi metos senpeke puran folion. (Eroŝenko, El la Vivo de ĉukĉoj, 1933)

[...] se li anoncus sian intencon iri Ostendon anstataŭ Berlinon. (John Merchant, Tri Angloj Alilande, 1936)

[...] en eventuala plua reklamo li postulu magiiston anstataŭ optimiston. (Cezaro Rosseti, Kredu Min, Sinjorino!, 1949)

La danĝeran laboron li lasis al la honestaj kamaradoj, kaj li tranĉadis la kadavrojn, anstataŭ la vivantan malamikon!

(Sándor Szathmári, Satiraj Rakontoj, 1950–1959)

Oni demandis lin, ĉu lia patro [...] batis la vizaĝon de siaj infanoj, **anstataŭ ilian postajojn**. (Szilágyi, *Vespera ruĝo anoncas ventegon*, 1950)

[...] **anstataŭ la placon** Nikitskie-Vorota li vidis la blindigajn lumojn de la placo Arbat'. (Pokrovskij, *La Majstro kaj Margarita*, 1991)
[...] mi uzas la psikologian signifon de la vorto "arketipo," laŭ la *Suplemento de PIV*, **anstataŭ la tradiciajn tradukojn** [...] (Broadribb, *La Respubliko*, 1993)
[...] li nun preferas savi sian vivon **anstataŭ la farbsitelon** [...] (Kaiser, *Mortula ŝipo*, 1995)
[...] **anstataŭ florojn** Dumna donis al ni tute malgrandajn, sed perfektajn, korbetojn. (Löwenstein, *La Ŝtona Urbo*, 1999)

En la ĉi-supraj ekzemploj la akuzativo efektive ne necesas, sed en la du sekvaj ĝi ja kontribuas al klareco:

La danĝeran laboron li lasis al la honestaj kamaradoj, kaj li tranĉadis la kadavrojn, anstataŭ la vivantan malamikon! (Sándor Szathmári, *Satiraj Rakontoj*, 1950–1959) (Sen la akuzativo, oni eble pensus, ke li anstataŭis la malamikon en la tranĉado de kadavroj.)
[...] *la komitato elektis, anstataŭ lin, E. J. Woessink kiel estraron.* (Lapenna, *Esperanto en Perspektivo*, 1974) (Sen la akuzativo, oni eble supozus, ke la komitato anstataŭis lin en la elekto de Woessink.)

Konklude, kelkaj aŭtoroj jen kaj jen uzas akuzativon tuj post *anstataŭ*. Preferinde tia uzado fontu el reala bezono de klareco.

Sindonemo

IVANIĈKA MAĜAROVA (Ur. Razgrad, Bulgario, Eŭropo)

Kun dankego kaj memoro pri ĉiuj el la unua linio,

en ĉi tiu malfacila situacio por nia lando

kaj la mondo trafita de KOVIM-19.

A tente, li metis sian poŝtelefonon apud sin kaj fermis la okulojn. La laciĝo pezis sur liaj palpebroj. Jam dum unu monato li ne povis satdormi kaj ripozi. La streĉo estis nekredbla. Kiom da tempo pli li povus elteni?

Li eksentis soifon, li leviĝis kaj prenis la boteleton kun minerala akvo. La gluto refreŝigis lin. Li ne sentis malsaton, nur soifo turmentis lin plurajn tagojn. Se li povus dormi almenaŭ duonhoron, li verŝajne sentus sin pli bone. Denove li fermis siajn okulojn, atendante la dolĉan dormeton.

Pika sono de la poŝtelefono rompita la silenton.

Lia mano ekserĉis la telefonon.

— Mi vestas min kaj foriras — li rapide respondis ne atendinte la voĉon el la telefono.

— Paĉjo...

— Ho, karuleto, ĉu estas vi? — rideto ekbrilis sur lia vizaĝo.

Rapide li ŝaltis la videokonekton. Sur la malgranda ekrano ekbrilis la vizaĝo de lia tri jara filineto Nija. Ho, kiel ŝi mankis al li.

— Paĉjo, kiam vi venos?"

— Baldaŭ, infaneto mia. Ankoraŭ iom da tempo kaj paĉjo revenos hejmen. Kiom vi faras?"

La etulino ion pepadis, sed ŝia voĉo estis rompita de la akra sono de la telefono.

— D-ro Dejanov, vestu vin! Ni foriras! — La laŭvica ordono estis donita.

Ĉi tie la minuto gravas, ĝi estas tre grava por savi homan vivon.

Li apenaŭ ekleviĝis de la soflito. Lia kapo estis peza, liaj kruroj ne obeis lin, kaj li ne povis spiri normale. Li faris paŝon al la pordo, sed kvazaŭ stumblis je io, ekbalanciĝis kaj preskaŭ falis sur la liton.

"Kio okazas al mi?" — ĉi tiu penso fulmrapide pasis tra lia kapo. Li trinkis gluton da akvo kaj sidiĝis sur la randon de la soflito. Li levis manon por tuŝi sian frunton. Sed io haltigis lin kaj lia mano restis pendanta en la aero. Tio ne estis necesa. La simptomoj estis klaraj.

"Kiam kaj kiel tio okazis?" — la unua penso venis al lia kapo.

— "Ĉu tio estas tiom grava?" — li respondis al si mem.

Li sciis, ke tio povus okazi. Ĉiuj, kiuj ĵuris la Hipokraton ĵuron, sciis tion.

"Vi ne estas devigata! — lia edzino ekkriis, kiam li diris al ŝi, ke li decidis fariĝi volontulo en "Urga helpo" — Vi estas kirurgo, eĉ ne kardiologo."

“Jes, sed mi estas kuracisto! Kaj mi povus sukcese plenumi mian devon. Ne sufiĉas kuracistoj! Volontuloj estas necesaj.”

“Kaj vi pretas iri tuj? Se io okazos al vi? Tiam?”

“Tio povas okazi al ĉiu ajn. Sed oni uzas ĉiujn preventajn rimedojn, kiujn la ŝtato provizas por protekti nin.”

“Tio ne garantias al mi, ke vi estos protekta! Kaj ĉu vi pensis pri mi, pri la infanoj, se io okazos al vi!”

“Ĉi tio povas okazi al ĉiu ajn, kiu laboros en ĉi tiu malfacila por nia lando situacio. Ĉu ni rajtas rifuzi plenumi nian devon, la devon de ĉiu kuracisto?”

“Sed tio ne estas via devo! Vi estas kirurgo. Vi ne estas devigita riski!”

“Sed mi iras kiel volontulo. Ne sufiĉas kuracistoj. La kirurgiaj fakoj estas fermitaj, oni ne faras operaciojn, eĉ la planitaj estas prokrastitaj. “Urga helpo “bezonas medicinistojn. Mi estas kuracisto kaj mi pensas, ke mi scipovas labori tion.”

“Ne faru ĝin, mi petas vin! Mi timas pri vi, pri ni, se la plej malbona okazos. Pri infektitaj medicinistoj kaj mortintaj oni informas, ĉiutage. En la statistiko ilia procento estas la plej alta.”

“Mi konsentas, sed ili estas tie ĉar ili estas fidelaj al sia devo. Komprenu min precize, karulino, mi ne povas esti nur observanto, kiam nia lando bezonas kuracistojn, kiuj povus helpi kaj savi nin de ĉi tiu nekonata infekto. Ĉu mi povas resti indiferenta, mi eĉ dirus kiel

kuracisto- flanka observanto, kiam miaj kolegoj, kun granda peno, klopodas venki ĉi tiun teruran malsanon.”

“Mi komprenas vin, sed ankaŭ vi komprenu min. Mi timas! Se io okazos al vi, mi ne povos travivi ĝin. Kaj kio pri la infanoj! Ĉu vi pensis pri ili?”

“Karulino, mi pensis tre longe antaŭ ol tion decidi. Mi pensis pri vi kaj la infanoj. Vi ja scias kiom forte mi amas vin. Mi estas preta je ĉio ajn por vi. Mi havis malfacilan elekton. Mia devo de kuracisto kaj mia amo, mia timo pri vi. Mi estas kuracisto, kiu ĵuris la plej humanan — la Hipokratano ĵuron.”

Post ĉi tiuj vortoj li etendis sian manon kaj forte premis sian plorantan edzinon al sia brusto. Ili ne parolis pli. Li ne vidis ilin dum pli ol monato, sian edzinon kaj la infanojn - Nija kaj la kvinjaran Orlin. La telefono estis la nura ligo inter ili. Ĉi tiu konversacio fulmrapide pasis lian menson. Li ekserĉis apogon sur la sofolito, sed ĝi estis malproksima, kaj li malsupreniĝis sur la plankon. — Doktoro, ni atendas vin! Ni jam malfruigis! — flegistino Anna ekstaris ĉe la pordo, vestita en protektaj vestaĵoj, kun masko kaj kasko. — Ho mia Dio, doktoro Dejanov, ĉu vi aŭdas min? — ŝia voĉo tremis. La flegistino faris paŝon antaŭen, poste haltis. Ŝi volis foriri sed turnis sin al la kuracisto, kuŝantan sur la planko, kaj diris kviete, kvazaŭ al si mem:

“La tricent dektria.”! ■

Koreaj Malnovaj Rakontoj

Eld. Korea Esperanto-Asocio
2020 (dua preso)
Esperantigis Cho Sung Ho

PAŬLO SERGIO VIANA

Popolaj fabeloj estas bona vojo al la animo de popoloj. Zamenhof mem tion konsciis, tial li tradukis la Fabelojn de Andersen, kiuj fariĝis eminenta juvelo en nia literaturo.

Ofte oni ligas tiajn fabelojn al porinfana literaturo, sed fakte ili ne estas ekskluzive porinfanaj. Ili estas trezoro de popola psikologio, eble al popola saĝo. Plenaĝuloj povas legi ilin el alia vidpunkto ol infanoj.

Unu aspekto de tradiciaj fabeloj estas la enhavo de krueleco kaj perforto en la rakontoj. Ni pensu pri la Ruĝa Ĉapo, kies avinon la lupo englutis vivanta; ni pensu pri Joĉjo kaj Mario, kiujn maljunulino en la arbaro kaptis kaj intencis grasigi por manĝo; ni pensu pri la venena pomo transdonita al Neĝulino, kiu preskaŭ poreterne endormiĝis; k.t.p....

Ekzistas homoj, kiuj emas forigi tiujn krudaĵojn kaj perfortojn el la fabeloj, kun la argumento, ke ili misinfluas infanajn mensojn. Tre diskutinda opinio. Persone mi emas respekti la klasikecon de tiuj fabeloj kaj ne ŝanĝi ilin. Eble precize pro tiaj trajtoj ili fariĝis klasikaj. Modernaj gepatroj emas protekti siajn infanojn kontraŭ ĉiaspeca sufero en la vivo, sed tio estas nebla. La vivo estas en si mem iom kruda, kaj homoj devas realisme kompreni tion kaj prepari sin por la “Batalo de l’ Vivo”.

Miaopinie, tia estas la valoro de klasikaj fabeloj.

Kiam mi prenis la “Koreajn Malnovajn Rakontojn” (dankon al amiko Lee Jungkee, kiu donacis al mi ĉi tiun belan libron) por legado en nia Esperanto-Sumoo, mi havis ĉi tiun demandon en la kapo: ĉu ankaŭ orientaj fabeloj enhavas tiujn kruelajn, suferajn elementojn, same kiel niaj okcidentaj?

La 100-paĝa volumeto enhavas kvin fabelojn en bonega Esperanto. Oni legas ilin flue kaj plezure, ne nur ĉar iliaj intrigoj estas interesaj, ilia fantazio riĉa kaj ilia priskribo poezieca, sed ankaŭ pro la trafa Esperantigo. En ĉiuj oni trovas tragikon kaj suferon, kiujn oni devas transpasi. Jen la instruo por infanoj kaj plenkreskaj homoj: la vivo estas vojo plena de baroj, stumbloj, vundoj kaj maljustaĵoj, sed ankaŭ de venkoj kaj sinsuperado. Kelkaj rakontoj estas miksitaj kun amuzo (kiel la fabelo pri la hepato de leporo), aliaj senrimede larmigaj (kiel la rakonto pri du fratinoj, kiuj suferis persekuton de vicpatrino). Sed en ĉiuj oni perceptas la noblecon de sentoj super ĉiaj doloroj.

En orienteca atmosfero, okcidentano povas trovi en ĉi tiu libro bonegan legaĵon. Mi entuziasme rekomendas ĝin! ■



ANNA LOBO

"SERGIO"

Originala titolo: Sergio

Direktoro: Greg Baker

Aktoroj: Wagner Moura, Ana de Armas kaj Garret Dillahunt

Tipo de filmo: biografia dramo

Lando: Usono

Lanĉo: 28.01.2020

Tempodaŭro: 118 min



Pensante pri la filmoj kiujn mi spektis, mi memoris pri tiu tre interesa biografia filmo, kiun mi spektis antaŭ iom da tempo. Ĝi estas usona filmo, sed kun forta ligo al Brazilo, pro tio ke ĝi rakontas pri granda parto de la vivo de la brazila diplomato ĉe ONU - Sergio Vieira de Mello.

Wagner Moura, la aktoro kiu faras la rolon de Sergio estas ege laŭdinda. Ŝajne li bone eniris en la haŭton de tiu grava tutmondeca personeco. Oni bone pentris la personecon, idealismon kaj revemon de Sergio, kiu tiom faris por ke la mondo iom pli paciĝu pere de lia komunika interveno en lokoj treege komplikaj. La vidpunkto kaj filmagado de la direktoro estas ege bela kaj dinamika. La spektantoj kunvojaĝas inter la diversaj pejzaĝoj de la filmo - Brazilo, Orienta Timoro, Irako kaj

Bagdado. Estas treege kortuŝaj scenoj inter tiuj popoloj. Oni povas rimarki la gravecon de tia agado por ke estu pli bonaj internaciaj rilatoj inter la landoj tra la mondo, kaj ĉefe kiom inspira estis la sindonemo de Sergio tiucele.

Efektive, oni imagas ke estas kelkaj malhelpoj ĉar ofte li ne povis esti sufiĉe proksime de sia familio, ĉefe de siaj filoj. Tio okazis ĉar li ofte estis vokata por vojaĝi al ege foraj landoj, kaj ĉiam kun ebleco pri murdo aŭ ia malbona reago kiu povus esti serioza.

Mi invitas vin spekti tiun ĉi interesan kaj inspiroplenan filmon, kaj ekkoni iom pli pri la historio de tiu grava Brazilano - Sérgio de Mello - kiu tiom malavare sindonis al la homaro. Ĝi spekteblas per Netflix. Bonan spektadon kaj ĝis la sekva filmo! ■

Via retbutiko...



...malfermiĝis

<https://easp.org.br/libroservo>